**Postvivo de la interlingvistika fako**

Kvankam en 2024 finiĝis la postdiplomaj kaj ankaŭ la magistraj studoj pri interlingvistiko, okazas ankoraŭ diversaj agadoj en tiu ĉi tereno.

- En la unua semestro okazis la anglalingva **kurso *International communication – international languages***, gvidata de Michael Farris kaj Ilona Koutny kiu – kiel kutime en la pasintaj jaroj ekde 2008 – allogis studentojn ne nur de la Etnolingvistika Fakultato, sed ankaŭ Erasmus-studentojn.
- Du ĉinaj gestudentoj kiuj planis origine partopreni la interlingvistikajn magistrajn studojn kaj ĉina ekstera doktoriĝantino havis **esperanto-kurson** ĉe Ilona Koutny.
- Aperis la **ĉeĥa versio de la termvortaro**-ĉapitroj ellaboritaj far Ilona Koutny por la UK.
- Pretiĝas ankaŭ la anglalingva **libro *Approaches to Interlingustics and Esperanto Studies*** enhavante studojn de la partopenantoj de la Interlingvistika sekcio de la Internacia Kongreso de Lingvistoj (2024, Poznano) kaj aliaj fakuloj de la tereno. Redaktoroj: Ilona Koutny kaj Nicolau Dols.
- Pretiĝas la sekva, jam la **5a volumo de Interlingvistikaj Studoj pri instruado** de Esperanto. Redaktoroj: Ilona Koutny kaj Katalin Kováts.

La gvidinto de la studoj multe vojaĝadis ĉi-jare kun prelegoj kaj kun espero trovi daŭriganton por la Interlingvistikaj studoj:

- *Kolokvo pri terminologio* en La Chaux-de-Fonds (Svisio) kaj vizito en Lausanne. Ŝi prezentis kiel leksikografio kaj terminologio renkontiĝas en la temvortaro ellaborata far ŝi.
- Laborkunsido kun prof. Dols en Majorko kaj prelego en la universitato pri tipologio de Esperanto.
- Dum **BET (Baltiaj Esperanto-tagoj en Kaŭno**, Litovio) okazis 5 prelegoj: unu resumis la universitatan instruadon de Esperanto fokusante al la studoj en AMU kaj 4 prelegoj traktis kulturon: *Esperanta kulturo – ĉu propra, ĉu transprenita, ĉu internacia?; Interkultura komunikado per Esperanto; Pri kio ni parolas kaj kiel? Ĝentileco internacie tra esperanto; Kolora lingva bildo de la mondo.*
- Dum *IKU* de **UK (en Brno**, Ĉeĥio) temis pri la temvortaro kies reta versio aperis dank'al Milan Kolka kaj leksikografio. Dum la *Esperantologia konferenco* ŝi prelegis pri *plurlingvismo kaj Esperanto en la epoko de la artefarita intelekto*. Tiuj prelegoj rezultigis al ŝi la Power-premion pro bona scienca preleganto.
- Ŝi estis invitita kun prelego ankaŭ por polaj Esperanto-eventoj kiel la **Krakovaj Esperanto-tagoj** kaj la **Esperanto sur la strando** en Sopot kaj Gdansko.

Fotojn eblas vidi en la retejoj kaj FB-paĝoj de La Ondo, Esperanto Sopot kaj Ilona Koutny